

ESPERANTO EN ĈINIO

Ronald J. Glossop por la 60-a EUSA-konferenco, Dalaso, Teksaso, 23 Jun 2012

La temo de ĉi tiu prelego estas “Esperanto en Ĉinio.” Tio estas grava temo ankaŭ por Esperantistoj en Usono ĉar ni devus konstati ke dum almenaŭ la pasintaj 62 jaroj, neniu landa registaro faris pli por Esperanto ol la registaro de la Popola Respubliko de Ĉinio.

Ŝajnas ke Rusaj komercistoj unue alportis Esperanton en Harbinon, Ĉinion en la jaro 1891[1] kaj poste al aliaj lokoj en Ĉinio kiel Ŝanhajo. Dum la postaj kelkaj jaroj informo pri Esperanto ankaŭ venis en Ĉinion per studentoj kiuj lernis pri ĝi en aliaj landoj kiel Japanio, Francio, kaj Anglio. En la jaro 1907 eĉ aperis artikolo en XIN SHIJI (NEW CENTURY), anarkista ĵurnalo eldonita en Parizo, kiu proponis ke Esperanto devus anstataŭigi la antikvan Ĉinan lingvon![2] Kaj en la jaro 1912 Cai Yuanpei, Ministro de Edukado en la Provizora Registaro de la Ĉina Respubliko, instruis la lernejojn oferti Esperanton kiel elekta studobjekto![3] Tamen pli granda parto de la movado venis poste.

Dum kaj tuj post la Unua Mondmilito grava progresema movado de junuloj okazis en Ĉinio responde al la grandaj ŝanĝoj kiuj jam okazis en Japanio. La Kvara de Majo Movado (1919) subtenas uzon de okcidentaj ideoj kiel demokratio, individuismo, kaj okcidenta scienco. Kelkaj revoluciuloj levis demandon pri la bezono por kelkaj ŝanĝoj en la ĉina lingvo, kaj unu, Qian Xuantong, eĉ argumentas ke Ĉinio devus uzi Esperanton![4] Post jardekoj venis simpligitaj ideografikaĵoj kaj la pinjina sistemo kun latinaj literoj. Ĝi efektive uzas kelkajn ideojn el Esperanto kiel la uzo de unu litero por la sonoj ĉ, ĝ, kaj ŝ. La ĉina registaro enkondukis la pinjnan sistemon en ĉiujn ĉinajn lernejojn en 1958.[5] La fakto ke ĝi uzas fonetikan sistemon tre similan al la sistemo de Esperanto poste multe helpas Ĉinojn kiuj volas lerni Esperanton.

La Komunista Partio gajnis komandon en Ĉinio en Oktobro 1949. Estis kelkaj gvidantoj de tiu partio kiuj estis Esperantistoj aŭ kiuj simpatias kun Esperanto.[6] La unua numero de la tre impona esperanta revuo EL POPOLA ĈINIO aperis post nur sep monatoj en Majo 1950. Dum la unuaj jaroj kutime unu numero havis eĉ 72 paĝojn kun multaj fotoj, ambaŭ nigraj kaj blankaj kaj koloraj. La artikoloj estis pri vivo kaj kulturo en Ĉinio kaj kelkfoje pri Esperantistoj en aliaj mondpartoj. La evidenta celo de la magazino estis informi kaj propagandi Esperantistojn en aliaj landoj pri la nova Ĉinio. La lasta papera numero de EL POPOLA ĈINIO en la jaro 2000 enhavis 52 paĝojn. Nun la reta versio de tiu magazino aperas ĉe la retpaĝo <<http://www.espero.com.cn>>. Tiu iom malsimila novaĵ-magazino fokusas atenton al la tuta mondo kaj ne plu nur al eventoj kaj aferoj kiuj rilatas al Ĉinio.

Oni fondis la Ĉinan Esperanto-Ligon (ĈEL) en Pekino je la jaro 1951, sed post du jaroj ĝi ĉesis. Dum la jaroj 1955-1956 EL POPOLA ĈINIO ne aperis. Feliĉe en 1956 sinjoro HUJUCZ, Vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, vizitis Moskvon kaj Ĉeĥion. Li eksciis pri la agadoj per Esperanto en tiuj lokoj, kaj pro lia peto kaj la ordono de Vicĉefministro CHEN Yi la Ĉina Esperanto-Ligo denove ekfunkciis.[7] En 1959 la ĈEL aranĝis la unuan E-elsendon ĉe Radio Pekino (nuna Ĉina Radio Internacia). En 1961 la Pekina Disaŭdiga Instituto (PDI), kies nomo post 2004 iĝis Ĉina Komunika Universitato (ĈKU), starigis Esperanto-fakon kaj la unuan kurson por profesie trajni studentojn pri Esperanto. Inter 1961

kaj 2010 59 homoj studis Esperanton eĉ kvankam la PDI tute ne funkcias de 1966 ĝis 1988 pro la 10-jara kultura revolucio kaj rilataj faktoroj. Ankaŭ bedaŭrinde tiuj studentoj kaj aliuloj kiuj lernis Esperanton en Ĉinio plejparte ne havis ŝancon studi eksterlande aŭ multe interkomuniki kun alilandaj Esperantistoj.[8]

En la jaroj 1989 kaj 2003 oni trovis la Esperanto-kursojn sub la Fakultato de Internacia Ĵurnalismo, kaj kutime la studentoj venis el aliaj fakultatoj kaj studis Esperanton nur du jarojn. En 2003 ses el sep studentoj poste laboris por la registaro ĉe EPĈ, ĈEL, aŭ ĈRI. En 2006 estis 12 studentoj kiuj elektis Esperanton kiel sian studfakon, kaj post kvar jaroj ili povis sukcesi en ŝtata ekzameno. Ĉu tio povus okazi en alia lando? Tamen ankoraŭ mankas taŭgaj lernolibroj kaj fakaj instruistoj kaj kursoj pri E-historio kaj E-literaturo kaj esperantologio, lingvistiko, kaj aliaj rilataj sciencoj. E-edukado ankaŭ ankoraŭ mankas en la superaj lernejoj de Ĉinio.[9] Samtempe la Esperantistoj kiuj laboras por EPĈ, ĈEL, kaj ĈRI kelkfoje nun havas ŝancon partopreni la kongresojn de Esperanto en aliaj landoj kaj interparoli kun Esperantistoj el aliaj landoj kiuj vizitas Ĉinion.[10]

Unue la registaro de Ĉinio subtenas Esperanton ĉefe kiel ilo por propagandi al aliaj landoj pri la nova Ĉinio, sed dum la 70-jaroj okazis pli da intereso pri Esperanto inter pliaj Ĉinoj.[11] En la jaro 1979 aperis en EPĈ nova slogano por Esperanto en Ĉinio: “Por la modernigado de Ĉinio per Esperanto.”[12] En 1985 la unua Ĉina Kongreso de Esperanto okazis en Kunming en sudokcidenta Ĉinio, kaj en 1986 la 71-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Pekino.[13] En 1991 la dua Ĉina Kongreso de Esperanto okazis en Tangshan, kaj en 1992 la kvina Pacifika Kongreso de Esperanto okazis en Qingdao, Ĉinio.[14] La Ĉina Junulara Esperanto-Asocio, la Ĉina Landa Sekcio de TEJO, estis fondita en 1993. En 1995 la tria Ĉina Kongreso de Esperanto okazis en Chongqing kaj ankaŭ okazis la 14-a Komuna Seminario (KS) (gejunuloj el Ĉinio, Koreio, kaj Japanio) en Tianjin. En 1996 la unua Azia Kongreso de Esperanto okazis en Ŝanhajo. En 1988 la 17-a Komuna Seminario okazis en Pekino. En 1999 la Kvara Ĉina Kongreso de Esperanto okazis en Guilin. En 2004 la 89-a Universala Kongreso okazis en Pekino, kaj proksimume 900 Ĉinoj partoprenis. En 2011 la Naŭa Ĉina Tutlanda Kongreso de Esperanto okazis en Hefei.[15]

En Ĉinio ekzistas ankaŭ pluraj regionaj konferencoj de Esperantistoj. Mi havis ŝancon viziti la grandan kaj imponan Sesan Esperanto-Kongreson de Nord-Orienta kaj Interna Mongolio de Ĉinio en Dandong en Aŭgusto 2010. Proksimume 150 homoj partoprenis inkluzive de multaj gejunuloj kaj vizitantoj el aliaj landoj kiel HORI Jasuo el Japanio kaj mi el Usono.[16] Estis multe da entuziasmo kaj serioza planado por la estonteco. Similaj regionaj kongresoj okazas en aliaj partoj de Ĉinio.

Nun ekzistas ideo ke ĉiuj Ĉinoj devas komenci lerni la anglan lingvon en la infanĝardeno[17], sed ŝajne la sola oficiala politiko estas ke oni devas montri kapablon en la angla lingvo por eniri kolegion aŭ universitaton. En Aŭgusto 2001 He Qixin diris ke ne ekzistas klara formala registara politiko pri la instruado de la angla en Ĉinio.[18] Tamen nun estas pli ol 400 milionoj Ĉinoj kiuj studas la anglan lingvon.[19] Sendube multaj ĉinaj gejunuloj por diversaj kialoj volas lerni la anglan lingvon. Ĉu tiu fakto estos problemo rilate al la lernado de Esperanto? Eble, sed ankaŭ eble ne. Ĉinaj gejunuloj ofte ne povas rapide kaj facile lerni la anglan, aparte la prononcado, sed ili eltrovas ke ili povas multe pli rapide lerni Esperanton.[20]

Iom nova faktoro rilate al Esperanto en Ĉinio estas la pli aktiva instruado de Esperanto en la lernejoj kaj la nova agado de la Ĉina Sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) sub la gvideco de Profesorino GONG Xiaofeng (Arko), kiu instruas ĉe Nanchang Universitato en la Fakultato de Media kaj Kemia Inĝenierado kaj kies retadreso estas <arko.gong@qq.com>. Ŝi aranĝis seminarion rilate al la instruado de Esperanto en Ĉinio en Taiyuan en 2010.[21] Ŝi ankaŭ organizis alian seminarion “ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA)” en 2011 en Tianjin.[22] Ni vidas ke nun estas pli multe da aktivado por Esperanto en Ĉinio krom tio kion la registaro faras por propagandi al eksterlandanoj.

Estas almenaŭ tri elementaj lernejoj en Ĉinio kie oni instruas Esperanton. Unu estas la Elementa Lernejo BaiyangshuJie (BYSJ) en Taiyuan kie WEI Yubin (Jado) <jado.wei@gmail.com> estas la estro de la lernejo. Alia estas Dongfang Elementa Lernejo en Changzhou kie CHEN Ye estas la kursgvidanto.[23] Tria estas en Zhenjiang kie la instruistoj de Esperanto estas Neĝeta SHI-FONTAINE kaj Michel FONTAINE <michel.fontaine13@wanadoo.fr>. [24]

Kiom da universitatoj en Ĉinio ofertas kurson en Esperanto? Ne estas facila afero provizi respondon. Dum la pasinta jardeko oni raportis ke TAN Xiuzhu, Prezidanto de la Ĉina Esperanto Ligo, diris ke en Ĉinio pli ol tridek universitatoj kaj kolegioj ofertas kursojn pri Esperanto.[25] Laŭ la Universala Esperanto-Asocio estas 18 universitatoj kaj kolegioj en Ĉinio kiuj instruas Esperanton.[26]

Tre speciala evento okazis ĉe Esperanto-Insulo, Hajnano, Ĉinio en Januaro kaj Februaro 2012. Efektive estis tri aferoj samtempe kaj samloke. Unu estis BEK-kurso por 82 komencantoj instruita ĉefe de Dennis KEEFE. La dua afero estis du kursoj por la tuta nova Universitato de Esperanto, “Filozofio kaj Historio de la Informadiko” instruita de Federico GOBBO kaj “Alfronti Militon” instruita de Ron GLOSSOP. La tria afero estis speciala metodika kurso por instruistoj instruita de Katalin KOVATS. Estis teamo de sep Ĉinoj kiuj faris multajn diversajn aranghojn por ĉi tiu grava evento.[27] Ĉiuj partoprenantoj spertis neforgeseblan etoson de vera tutmonda familio kaj senton ke Hajnan-Insulo estis kaj estonte estos grava ponto por Esperantistoj el diversaj mondpartoj.

En Julio 2012 la ĉiujara konferenco de ILEI okazos en Kunming, Yunnan provinco, Ĉinio.[28] Denove ĉiuj povos vidi ke Ĉinio iĝas ĉiam pli grava lando en la tutmonda Esperanto-movado.

NOTOJ

- [1] Vidu <<http://esperanto.china.org.cn/world/shi-window/index5.htm>>.
 [2] U. LINS, “Esperanto as Language and Idea in China and Japan,” Language Problems & Language Planning, 32:1 (2008), p. 48; kaj WON K., “Esperanto-movado en Ĉinio,” <http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-movado_en_Ĉinio>.
 [3] D. POULSON, “Esperanto in China” <archive.suite101.com-Esperanto>; kaj U. LINS, “Esperanto as Language and Idea in China . . . “ LPLP, 32:1 (2008), p. 49.
 [4] “Language Reformer Qian Xuantong Remembered,” Pinyin News, Archive for Esperanto, 19 Jan 2007 <<http://pinyin.info/news/category/languages/esperanto>>.

- [5] L. LIM, "At 105, Chinese Linguist Now a Government Critic" <<http://www.npr.org/2011/10/19/141503738/at-105-celebrated-chinese-linguist>>.
- [6] D. HARLOW, "Esperanto in China," E-Book chapter 10, (1995) <<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Ebook/chap10.html>>.
- [7] YU J., "Supera Eduko de Esperanto en Ĉinio," *Internacia Pedagogia Revuo*, 2012/1, pp. 11-12.
- [8] YU J., "Supera Eduko de Esperanto en Ĉinio," *IPR*, 2012/1, pp. 12-14.
- [9] YU J., "Supera Eduko de Esperanto en Ĉinio," *IPR*, 2012/1, pp. 14-18.
- [10] R. GLOSSOP, "Raporto pri instrua vojaĝo al Ĉinio en 2010," *IPR*, 2011/1, pp. 30-33.
- [11] D. HARLOW, "Esperanto in China," E-Book chapter 10, (1995) <<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Ebook/chap10.html>>.
- [12] U. LINS, "Esperanto as Language and Idea in China and Japan," *Language Problems & Language Planning*, 32:1 (2008), p. 54.
- [13] "Ĉina Interreta Informa Centro: Historio de Esperanto" <<http://esperanto.china.org.cn/world/shi-window/index5.htm>>.
- [14] Por ĉi tiu & la posta informo, vidu "Ĉina Interreta Informa Centro: Historio de Esperanto" <<http://esperanto.china.org.cn/world/shi-window/index5.htm>>.
- [15] <http://ilei.info/instancoj/Raportoj_Landaj_Sekcioj_ILEI_2011.pdf>, p. 12.
- [16] R. GLOSSOP, "Raporto pri instrua vojaĝo al Ĉinio," *IPR*, 2011/1, pp. 30-33.
- [17] C. WARD, "Ganbei! China embraces English language," ABC News <<http://abcnews.go.com/WN/China/china-pushes-english-language/story?id=12154435>>.
- [18] "Dressing down of China's English language policy at the national level" <<http://bbs.chinadaily.com.cn/thread-208296-1-1.html>>.
- [19] HE Na, "Rush to learn English fuels quality issues," *China Daily* 2010-08-05 <http://usa.chinadaily.com.cn/2010-08/05/content_11103536.htm>.
- [20] HUANG Y., "Ni semu en la plej indan lokon," *IPR* 2011/4, pp. 4-6.
- [21] GONG X., "Raporto pri la seminario de ILEI-Ĉinio en Taiyuan," *IPR*, 2010/4, pp. 26-30.
- [22] "ILEI-sekcioj aktiviĝas en Ĉinio" <http://esperanto.china.org.cn/2011-08/19/content_23244435.htm>.
- [23] <http://ilei.info/instancoj/Raportoj_Landaj_Sekcioj_ILEI_2011.pdf>, p. 13.
- [23] R. GLOSSOP, "Raporto pri instrua vojaĝo al Ĉinio," *IPR*, 2010/1, pp. 33-36 kaj R. GLOSSOP, "Raporto pri instrua vojaĝo al Ĉinio en 2010," *IPR*, 2011/1, pp. 30-33; kaj GONG X., "Raporto pri la seminario de ILEI-Ĉinio en Taiyuan," *IPR*, 2010/4, pp. 26-30.]
- [24] LU Anqi, "Esperanto in China 2004-2009" <www.rmhb.com.cn/chpic/htdocs/english/content/200409/5-2.htm>.
- [25] <<http://uea.org/agadoj/instruado/universitatoj.html>>.
- [26] D. KEEFE, "Esperanto-Insulo: eksperimento, tre intensa studa monato en Ĉinio," *ESPERANTO*, Aprilo 2012, pp. 76-77; D. KEEFE, "BEK-Kurso: Netradicia maniero por instrui la prefiksojn de Esperanto," *IPR*, 2012/1, pp. 18-23; D. KEEFE, "Esperanto-Insulo I - Fokusiĝo sur la tre intensa kurso por komencantoj kaj NE-esperantistoj," *IPR*, 2012/2, pp. 12-17; kaj R. GLOSSOP, "Raporto el la E-insulo," *USONA ESPERANTISTO*, 2012:2 (mar-apr), p. 8.
- [27] GONG X. kaj R. PETROVIĈ, "La Unua Komuniko de la 45-a Konferenco de ILEI," *IPR*, 2011/4, pp. 34-41; WANG M., "El landoj kaj sekcioj: Ĉinio," *IPR* 2012/2, p. 35.